



**7(143)
2013**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Jerzy Harasymowicz

Madonna z Ptaszkowej

Jedyna w Europie
Księżna
Że wróble lecą
Do berła
W koronie
Jak snop łubinu
Madonna
Ze słonecznikiem
[...]
Która nam
Przychylasz góry
Z mrozu masz
Czerwone liczka

Niech nas Synka
Błogosławi
Z palcem jednym
Rękawiczka

Na wieków czarnej
Skrzyni
Ma sny niespokojne
Władczyni

Co zaś do twarzy
Słodyczy
Ma zapach
Czerwonych koniczyn

Wśród złotych
Polski resztek
Wśród wierzb
Strzyżnych wieszczek
Kukułka kuka
W dłoni
Małej Madonnie
Z Ptaszkowej

Madono el Ptaszkowa

En Eŭropo Princino
Escepta
Ĉar paseroj flugas
Al sceptro
En krono
Kiel lupena garbo
Madono
Kun helianto
[...]
Tiu kiu al ni
Montojn oferi pretas
Pro frosto havas
Ruĝajn vangetojn

Benu nin ĉiam
La Infanto
La unufingra
Fileta ganto

Sur la jarcenta
Kesto-patino
Malkviete sonĝas
Regantino

Kaj dolĉ-vizaĝo
De Madono
Per ruĝa trifoli'
Aromas

Inter oraj restaĵoj
De Pollando
Inter tonditaj
Salikoj profetantaj
Kukolas kukolo
En mano
Al eta el Ptaszkowa
Madono

Memore al Ĉielaj Patronoj. 66-a Kongreso de IKUE en Pollando.

"Kie du aŭ tri ariĝos je Mia Nomo, tie Mi estas inter ili". Jesuo KRISTO

Dum la "JARO DE LA KREDO" okazis en Kalwaria Zebrzydowska la 66-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). Por la tria semajno de julio (13-20), AD 2013 venis kelkdekoj da gefideluloj-geesperantistoj al la mondkonata kaj rekonita de UNESCO Sanktejo de la Dipatrino de l'Ĉielenpreno en Kalvario de Zebrzydowski-Familio por, kiel ĉiujare, kongresumi – preĝi, kanti, babili, diskuti, plani, revii, ŝerci, turismi kaj laŭdi la Dion kaj la Dipatrinon.

La IKUE-anoj de lokaj komunumoj de IKUE venis ĉifoje el Belgio, Brazilo, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Italio, Kamerunio, Kroatio, Malto, Pollando kaj Slovakio kaj inter kaj kun ili la pastroj: Romano Gmyrek, animzorganto de polaj geesperantistoj, Stanislavo Płachta, redaktoro de la revuo FRATECO, Stanislavo Płatek, animzorganto de IKUE-anoj en Triurbo, Jozefo Zielonka, meritoplena animzorganto de polaj geesperantistoj kaj Bernardo Eichkorn, animzorganto de la germana sekcio de IKUE.

La Honora Patrono de la Kongreso estis la ĉefepiskopo metropolito de Krakovo, Stanislavo kardinalo Dziwisz, kiu ne povinte persone ĉeesti ĉi Kongreson sendis la Diobenan kaj bondeziran mesaĝon al la gekongresanoj.

La ĉeftemo de la nunjara IKUE-Kongreso sonis: NOVA EVANGELIZADO.

La Gekongresanojn "honorigis" per sia restado en Pilgrima Hejmo de la kalvaria Sanktejo la prezidanto de Pola Esperanto Asocio inĝeniero Stanislavo Mandrak kaj la prezidantino de Silezia Esperanto Asocio magistrino Tereza Pomorska. Ambaŭ gesinjoroj – nerestipovaj pli longe, forvojaĝis kaj same ekfaris la pastro Jozefo Zielonka, kiu pro sia sanstato kaj pro por li sciataj kialoj ankaŭ, kiel nevolipova revenis hejmen post du tagoj de la kongresa semajno. Dum la kongresa semajno estis ankoraŭ pliaj gastigantoj – nepagipovaj aŭ nepagivolaj, kiuj venis kaj revenis same rapide.

En la Kongreso partoprenis krom la Ĝenerala Sekretario de IKUE – Carlo Sarandrea kaj pastro Pierluigi Svaldi, la tuta Estraro de IKUE kun la prezidanto Giovanni Daminelli kaj la membro de la Revizia Komisiono Kristoforo Tomczak, kiuj kunsidis dum la Kongreso.

La kongresan agadon gvidadis vicprezidantino de IKUE Marija Beloŝeviĉ, kiu estis dum la tuta jaro antaŭiginta la Kongreson – la gvidantino de la Kongresa Laborgrupo, prepariganta la kongresan aranĝadon.

Gekongresanoj loĝis en la Pilgrima Hejmo, en bonkvalitaj ĉambroj kaj manĝis en la pilgrima gastejo – laŭdata por la bongustaj manĝaĵoj.

Dum ĉiuj kongrestagoj estis celebrataj Sanktaj Mesoj en Esperanto kun la muzika akompano de Stefano Lepping – profesia muzikisto kaj orgenisto. Dum la Kongreso estis ofte kantata la Himno por la Jaro de la Kredo – Credo Domine, tradukita en Esperanton fare de la triopo: Antonio de Salvo, Stefan Lepping kaj Stanisław Śmigielski. Ĉiutage estis preĝataj: Anĝelusoj, Kronetoj por Dia Mizerikordo kaj la preĝadoj laŭ la vojetoj de Jesuo Kristo kaj de Dipatrino Doloranta. Krome – ĉiutage estis eblecoj por la persona preĝado ĉe la Kalvaria Mirakla Bildo de Dipatrino Ĉielenprena en la Sanktejo.

La ĉeftemo - LA NOVA EVANGELIZADO estis prezentita en la prelegoj de:

1. Vitor Luiz Rigotti dos Anjos el Brazilo pri la evangelizado en kelkaj kampoj de Meksiko, Afriko kaj Brazilo;
2. Marija Beloŝeviĉ el Kroatio pri la evangelizado en modernaj komunikiloj;
3. Stanisław Śmigielski (PL) pri la fenomeno de la evangelizado de kristanoj en la Radio MARYJA kaj TV TRWAM;
4. Carmel Mallia el Malto pri la Biblio kiel ekvojiro al Nova Evangelizado;
5. Giovanni Daminelli el Italio pri la Edikto de Milano;
6. Pastro Atila Szep el Hungario pri la nova evangelizado – leteroj el la episkopa sinodo;
7. Pastro Gabriel Anda el Kamerunio pri la nova evangelizado – la tasko de ĉiu KRISTANO.

Okazis la vizito tra la kalvaria Sanktejo kun la ĉiĉeronado kiel ankaŭ unu el la formoj de la nova evangelizado.

Dum la kongresa semajno okazis du tuttagaj pilgrimoj-ekskursoj. Al Krakovo, kie estis vizititaj: episkopa palaco, Baziliko de Sankta Francisko, Vavelo, Baziliko de Dipatrino Maria kaj la Sanktejoj de Sankta Faŭstyna Kowalska kaj de Beatigita Johano Paulo la Dua.

La dua pilgrimo-ekskurso estis gvidita laŭ la spuroj de la gepatronoj de katolikoj-esperantistoj. En Auschwitz-Koncentrejo estis komuna preĝo ĉe la „bloko 11” kaj la metigo de la floroj en la ejo, kie estis murdigita Sankta Maksimiliano Maria Kolbe. Lige kun ĉi Patrono de IKUE estis vizitita ankaŭ la Cetro de Sankta Maksimiliano M. Kolbe en Harmęże, apud Krakovo.

Laŭvice en la urbo Kęty estis aranĝita la preĝo ĉe la tombo de la beatigita Celina Borzęcka kaj de Diservantino Fratolino Hedviga Borzęcka kaj vizito en la Monaĥejo de ĉi Fratulinaj.

En Wadowice gekongresanoj partoprenis en la Sankta Meso en la Baziliko de la Oferdono de Maria Plejsankta Virgulino (paroĥa preĝejo) kaj en la Muzeo – Gepatra Domo de Johano Paulo la Dua.

En la enhavoriĉa programo de ĉi Kongreso estis voĉlegitaj ankoraŭ la prelegoj de:

1. Jan Kalny el Ĉeĥio pri Sankta Faŭstina KOWALSKA;
2. Geedzoj Rita kaj Franz Georg Roessler pri Sanktulino Edith Stein;
3. Pastro Bernard Eichkorn pri kristana glosaro kaj pri IKUE-Fonduso;
4. Marija Beloŝeviĉ pri la martiroj de la 20-a jarcento;
5. Miloslav Ŝvaĉek pri la bilda retrospektivo de la 65-a IKUE-Kongreso en Pecs, Hungario.

Gekongresanoj vizitis ankaŭ la lokon Zagórnik, kie gastis en la lernejo je la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj kie ili vizitis la preĝejon – konstruitan gvide de la loka Pastro – animzorganto de geesperantistoj Leszek Solakiewicz, al kiu helpadis en la konstruad-kostoj internacia esperantistaro per la monrimedoj – tiel nomataj „brikoj” por ĉi preĝejo.

En la kulturdomo en Zagórnik la Gekongresanoj regaliĝis per la popola muziko, kanto kaj danco de ”La Popola Ensemblo de Kanto kaj Danco ANDRYCHÓW”.

Dum la Kongreso okazis la plena kunsido de IKUE-anoj - Gekongresanoj, dum kiu post la interesa diskuto, estis decidita la loko de la venontjara - EKUMENA KONGRESO en Trento, Italio. Por la jaro 2015 estis anoncita la propono kongresi en la mondkonata Sanktejo en Licheń.

Dum la Kongreso estis spontane aranĝita la komuna kantado de ekleziaj kantoj en Esperanto kaj en la pola lingvo kun la grupo da pilgrimantoj el la apudpoznana urbo Śrem, dum kiu estis promesita lerni Esperanton flanke de la animzorganto – la Pastro de ĉi kantema grupo da gefratoj.

En la preparlaboroj por la kalvaria Kongreso aktive partoprenis la krakovaj gefratoj: Zbigniew Duda, Lidia Ligęza kaj Andrzej Kołpanowicz, danke al kiuj estis bonorde preparitaj la kongresaj libroj kaj presaĵoj, ĉiĉeronado tra Krakovo, busoj por vojaĝoj kaj aliaj etaj sed gravaj aferoj.

Kelkaj tagoj da kongresa tempo pasis rapide, sed multaj kortuŝaj travivaĵoj kaj impresoj pliriĉigis ĉiujn gekongresanojn-gepilgrimantojn permesinte memori pri la tradicia pola religio kaj gastameco.

Per la gajaj adiaŭaj vortoj kaj DIO BENU gekongresanoj interfiksis renkontojn dum la venontaj Kongresoj de katolikoj-esperantistoj.

Stanisław Śmigielski - kongresano

FRANCISZKA BARDECKA

Ŝi estis konata, aktiva porkatolika agantino kaj aktiva esperantistino laboranta en la propra paroĥejo al S-ta Stefano, kiel gvidantino de misia kolegio. De la 1964-a j. ŝi okupiĝis pri Esperanto kaj ekde la jaro 1968-a zorgis pri katolikaj, esperantaj aranĝoj en la krakova medio. Ŝi organizis esperantajn ĉiumonatajn Di-servojn en diversaj preĝejoj ekz.: de Patroj Franciskanoj kaj al S-ta Stefano, ofte ornamitajn de konvenaj elpaŝoj de krakovaj aktorinoj Jadwiga Gibczyńska kaj Anna Ramza. Precipe Ŝi zorgis pri ĉiujaraj pilgrimadoj al Sanktejo al Mizerikorda Jesuo en Krakovo-Łagiewniki, kiujn tre volonte vizitadis eksterkrakovaj esperantistoj.

Franciszka Bardecka kompakte kunlaboris kun esperantaj animzorgantoj, pastroj: Franciszek Tokarz, Józef Zielonka kaj patro Stanisław Płachta. En unu el oblataj renkontoj, en 90-aj jaroj de la XX jarcento partoprenis invitita de Ŝi nuna varsovia arkiepiskopo Kazimierz Nycz, kiu fervore kantis kun ni esperantajn kantikojn. Ofte Ŝi reprezentis Pollandon dum internaciaj aranĝoj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Dum renkontoj de krakovaj katolikoj-esperantistoj Ŝi informis ilin pri la pormisia agado kaj montradis lumbildojn de misiista laboro en foraj, ekstereŭropaj landoj. Ankaŭ ni ricevadis de Ŝi informojn pri agado de IKUE, kiu gajnis la sidejon en Katolika Intelektulara Klubo ĉe Sienna-strato en Krakovo. Zorgeme Ŝi kolektis katolikajn esperantajn librojn kaj precipe eble plenajn jarkolektojn de esperantaj revuoj kaj gazetoj, kiujn ni konservis je dispono al volontuloj.

Franciszka Bardecka ankaŭ partoprenis en laboroj de ĝeneralaj esperantaj organizaĵoj kaj kunlaborante kun ili organizis ekz. por Krakovaj Esperantaj Tagoj Sanktan Meson en preĝejo al S-ta Norberto.

Kvankam jam tre malforta, tamen Ŝi tre interesiĝis pri la lasta 66-a Kongreso de IKUE en Kalwaria Zebrzydowska petante telefonajn informojn pri ĉiuj aranĝoj.

Dum la entombiga solenaĵo, 29-an de aŭgusto 2013, je la 12:20 multaj personoj partoprenantaj en la S-ta Meso kaj eskorto tomben rimarkis kvin sacerdotojn: eksparoĥestron Andrzej Waksmański, paroĥestron Leszek Garstka, pastrojn Józef Zielonka kaj du misiistojn, kun kiuj ŝi kunlaboris.

En nia memoro Franciszka Bardecka restos kiel fervora katolikino kaj aktiva agantino de katolika esperanta movado.

Krakova Societo ESPERANTO kun la tristo sciigas,
ke forpasis
s † m

Franciszka BARDECKA

(6.03.1923 – 24.08.2013)

fervora agantino de esperanta katolika movado

La funebra diservo kaj entombigo okazis en Krakovo
sur Rakowice-Tombejo, 29.08.2013, je la 12:20 h.

Geamikoj kaj Gekonatoj